# *Kuba prezidento deklaras oficialan kaj nacian funebron*



Havano, feb 10 (RHK) Kun profunda beda?ro, nia popolo eksciis pri la morto de la kara amiko de Kubo, Lia Ekscelenco. S-ro D-ro Sam Nujoma, Fondinto kaj unua Prezidanto de la frata Respubliko de Namibio.

Dum sia tuta vivo li pruvis specialan korinklinon al Kubo kaj subtenon al la Kuba Revolucio, ekde la etapo en kiu li gvidis la heroan namibian popolon en la batalo por sendependeco kaj poste, kiam li alprenis la plej altan gvidadon de sia naski?anta sendependa ?tato kaj anka? kiel afrika gvidanto, simbolo de firmeco kaj defendo de justaj kialoj.

Li estis fervora iniciatinto de solidareco kaj kunlaboro kun Kubo kaj neniam ?esis rekoni kaj aprezi la kuban kontribuon al la luktoj por la liberigo de Afriko kaj la fino de rasapartismo.

La kuba popolo kaj Registaro ?iam aprezos lian subtenon en la batalo kontra? la blokado. En 1991, li estis premiita per  la Ordeno José Martí, la plej alta distingo koncedita fare de la Kuba ?tato.

"La kuba Partio, Registaro kaj popolo transdonas sian plej profundan kondolencon al la popolo kaj Registaro de la frata Respubliko de Namibio, kaj anka? al familio kaj amikoj."

Tial, Oficiala Funebro estas deklarita de 6:00 a.m. de la 10-a de februaro ?is 12:00 nokte la 11-an de februaro 2025 kaj Nacia Funebro la 12-an de februaro 2025, de 6:00 a.m. ?is la 12-a nokte.

Dum kaj la Oficialaj kaj Naciaj Funebroj, la kuba flago estas levita ?e duonmasto en publikaj konstrua?oj kaj armeaj institucioj.

Same, dum la Nacia Funebro validas, publikaj spektakloj kaj festaj agadoj estas suspenditaj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/376232-kuba-prezidento-deklaras-oficialan-kaj-nacian-funebron

**Radio Habana Cuba**